

# ESPERANTO



OFICIALA ORGANO  
DE INTERNACIA  
ESPERANTO-LIGO

# INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 5

MAJO 1946

**GRUPESTROJ KURSGVIDANTOJ INSTRUISTOJ**

Jen fine solvo de via problemo !

Jam ne necesas ke grupkunvenoj kaj kursoj  
velku pro enuo

## GAJA LEGANTO PER ESPERANTO

de P. E. SCHWERIN

Spritaĵoj — Vortludoj — Preseraroj — Anekdotoj  
Matematikaĵoj — Rimaĵoj — Societludoj  
Konsiloj por Grupestroj kaj Kursgvidantoj  
Demandaro

Prezo : 1 ŝil. 3 pencoj, afranko 1 p.  
(5 internaciaj respondekuponoj)



*Eldonita de*

**THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.**

*Mendu ĉe*

**INTERNACIA ESPERANTO-LIGO**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

# ANONCETOJ

*Kosto : du pencej por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiuj du vortoj.*

**Reĝisoro** de Ĉeĥoslovaka radiostacio volas korespondi kun gesamideanoj de tuta mondo pri disaŭdigaj demandoj, radiofako, arto kaj jahtado. S-ro Karel Skopel, Radio-stacio, Moravská Ostrava, Ĉeĥoslovakujo.

**Korespondant(in)oj dezirataj** en ĉiuj landoj de S-ro H. G. Onn, 22 Vera Street, Port Pirie, South Australia.

**Internaciaj Feriaj Esp-Kursoj** : Danlando : Hadsten 13-20 de julio kaj 20-27 de julio, 1946. Helsingør 28/7-4/8, 1946. Kostoĵ 56,00 kr., 63,00 kr. kaj 75,00 kr. laŭ ĉambro kaj loko. Bonega kaj abunda manĝaĵo. Petu prospekton ĉe L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

**Kiu Esperantisto** aŭ Asocio povos helpi min ricevi kaŭĉukajn radringojn de biciklo por la laborado en nia Asocio ? S-ro J. S. Ruiter, 2a Hollandiastr. 12, Bolsward, Nederlando.

**Bulgara samideano** deziras korespondi kun anglaj Esperantistoj. Ilija Petrov (faka instruisto en la gimnazio) Popov, Bulgarujo.

**Fraŭlo 31-jara** deziras havi plumkon-takton kun fraŭlinoj 25-32-jaraj. Respondu al J. Riksmann, Krekelstraat 14a, Rotterdam, Nederlando.

**S-ro Ploss Josef**, Skuherského 63, České Budějovice, Ĉeĥoslovakujo, petas gesamideanojn kaj Esperanto-gazetojn, redakciojn, Esperanto-societojn, klubojn kaj Asociojn pri afabla sendo de propaganda materialo por Esperanta ekspozicio.

**Ĉeské Budějovice**, Ĉeĥoslovakujo, Esperantista Klubo "La Progreso", Šumavská 250 serĉas korespondantojn el ĉiuj landoj. Klubejo : Hotelo "Slunce" (la suno) Masarykplaco ; kunsidoj ĉiumarde je la 20a horo.

**Hotelo "Slunce"**, České Budějovice, Bohemio, Ĉeĥoslovakujo, rekomendinda entrepreno kun bona manĝaĵo kaj trinkaĵo, invitas ĉiujn vojaĝantajn Esperantistojn. Oni parolas Esperante !

**Jaroslav Šustr**, Praha I, Benediktska 11, Ĉeĥoslovakujo, serĉas gekorespondantojn en tuta mondo.

**Ĉeĥoslovakaj policistoj**, anoj de "Polica Esperanta Rondeto en Praha" deziras korespondi kun la policistoj el tuta mondo. Adreso de internacia delegito : V. Zámstny, Praha XI, Palackého 26.

**Eldoniĝas senpage** al ĉiuj interesatoj angla-Esperanta gazeto "Pacifist-Esperantista Bulteno", Pownal, Maine, Usono.

**La Kvakerismo** (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

**Reprezentadon kaj importadon** de teknikaj, speciale elektro-teknikaj, varoj serĉas por Argentino kaj Urugvajo, Ing. Lázaro Musih, Pedro Goyena 38, Buenos Aires, Argentino.

**Gesamideanoj tutmondaj!** La 3an de junio ni aranĝos letervesperon. Skribu multnombre al : Societo Esperantista "Nova Sento". Respondo garantiata. Sekr. : S-ro C. J. Timmerman, Herzogstraat 40, De Helder, Nederlando.

**Mi petas** ĉiujn sinjorojn ĉefdelegitojn de I.E.L. sendi al mi dek ekzaktajn receptojn de la plej bongustaj naciaj manĝaĵoj de sia lando. La manĝaĵoj konsistu ekskluzive el nur : fiŝaĵoj, viandaĵoj aŭ farunaĵoj. Se ne ekzistas en Esperanto terminoj por iuj spicoj, bonvolu do uzi anglan, rusan, francan aŭ ĉinan lingvon. Ĉiu el vi ricevos rekompence kvarlingvan libron de manĝaĵterminaro. Krome mi volonte interrilatus, kun celo fondi universalan asocion, kun gekelneroj, hotelestroj, restoraciestroj, kafejestroj, hotelaj gasto-bonvenigantoj kaj gekuiristoj. E. Urban, Nusle II, Praha, Na Jezerce 3, Ĉeĥoslovakujo.

**Gelernantoj 8-11 j.** deziras interŝangi il. poŝtkartojn tutmonde ! Certe respondos. Bonvolu afranki bildflanke. Skribu al S-ro J. G. Teare, Halewood School, Liverpool, Anglujo.

**Ĉiulandaj Kristanaj Esperantistoj!** Kiel ni povus uzi Esperanton por nia plej alta ĉiela celo ? Ĉu ne tutmonda kristana gazeto estus benita ligilo inter ni ĉiuj ? Aŭ ĉu vi havas aliajn pensojn kaj revojn ? Skribu pri la afero al : Redaktoro Martti Putaala, Puutarhak 17, Oulu, Finnlando.

**Skribu tuj** al "Aŭdu" Amstetten, Aŭstrujo. 1000 membroj de Aŭdu atendas vian leteron kun granda sopiro. Metu ĉi-kune neuzitan leterpaperon por nia respondo, ĉar en Aŭstrujo mankas papero.

**Martinus** : De aprilo ni komencas eldonon de 20-paĝa revuo : *Esperanto-Revuo de Martinus*. Senpaga specimenumero havebla ĉe Livets Bog's Bureau, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F, Danujo.

**Medikamentan reprezentadon** por Hispanujo mi akceptas. S-ro Jacinto Boyer, Travesia Fúcar 20-2, Madrid, Hispanujo.



Eldonejo kaj Redakcio: Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 5

MAJO 1946

## NIA LINGVO

Nia organizaĵo, niaj fakaferoj, nia literaturo, la progresoj faritaj en diversaj rondoj—ĉiuj estas gravaj. Ili estas konkretaj, videblaj elmontroj de nia forto, de la enpenetriĝo kaj adaptiĝo de Esperanto en rilatoj praktikaj kaj objektivaj. Tamen ĉio finfine baziĝas sur unu sola afero—nia lingvo; nia lingvo kaj ĝia kapablo servi al la homoj laŭ ĉiuj ties postuloj kaj bezonoj.

Oni povas renkonti samideanojn, kiuj taksas la lingvon kiel negravaĵon, preskaŭ kiel bedaŭrinde necesan kromaĵon, kiun oni devas nur iomete atenti por sukcesigi siajn praktikajn (!) planojn kaj skemojn de la ĉiutaga vivo. Tiuj niaj kunlaborantoj ne volas intime rilati kun la lingvo *kiel lingvo*, kun ĝiaj subtilaĵoj, delikataj nuancoj kaj esprimpovoj. Ili diras, ke Esperanto estas antaŭ ĉio ilo, kiun oni uzu. Oni ne malŝparu tempon pri tio, ĉu tiu aŭ ĉi tiu vorto estas la ĝusta aŭ la plej taŭga. Praktika homo ne havas tempon por sencela teoriumado ktp., ktp. Tiu vidpunkto ne estas malofta kaj bedaŭrinde oni per tio celas pravigi plej strangajn uzadojn kaj plej monstrajn neologismojn. Ŝajnas al mi, ke praktika homo estas tiu, kiu scias kion li celas kaj direktas ĉiujn fortojn kaj ekspluatat ĉiujn plej bonajn rimedojn por atingi tiun celon. Ĉar en Esperantaj aferoj lingvo ludas gravan rolon, unu el la plej bonaj rimedoj por atingi praktikan rezultaton estas modela lingvostilo.

Ni deziras aludi pri ĉi tio ĉar de tempo al tempo ni ricevas por presado en nia gazeto artikolojn kaj leterojn, kiuj ofte enhavas neologismojn kaj tre kuriozajn formojn kaj esprimojn. Mi estas certa, ke ilin sendas bonaj kaj praktikaj homoj ĉar tre ofte la leteroj donas valorajn konsilojn aŭ pritraktas interesajn temojn. Tamen la stilo ofte estas tia, ke ni devas aŭ malakcepti la proponitan artikolon aŭ ĝin redakti tiel, ke ĝi estos taŭga por niaj legantoj.

Ŝajnas al mi, ke tiuj kiuj verkas artikolojn, ne ĉiam sufiĉe atentat la rolon de la legonto. Oni rajtas antaŭsupozi gradon de inteligenteco ĉe la legonto, sed oni ja devas ne atendi ke tiu lasta estu instruita pri lingvoj. Tial prudente estas ne trudi en sian stilon aron da radikoj, kiun neniu krom poligloto povos rekoni. Modela stilo estas stilo klara, simpla kaj komprenebla *por la leganto*. Mi opinias, ke en la momento kiam Esperanto fariĝos tiel malsimpla—ĉu pro neologismoj, ĉu pro komplikita gramatiko—ke ĝi ne estos tuj komprenebla por ĉiuj homoj, ĝi jam ne havos ekzistkialon.

Ni tial penadas, ke la stilo en nia gazeto estu kiel eble plej simpla kaj komprenebla kaj ni redaktas artikolojn tiucele, provante tamen konservi la

originalan ĝeneralan stilon. Ni akceptas kiel bazan principon, ke ĉiu radiko en *E.I.* nepre troviĝu en *Plena Vortaro* kaj en okazoj, kie neologismo estas necesa, nepre alestu indiko pri la signifo. Povas esti, ke ni ne ĉiam sukcesas en tio ĉar neniu povas koni la tutan enhavon de *P.V.*: tamen se kontribuontoj estus same singardaj, neologismoj eĉ pli malofte enŝteliĝus.

En tiu ĉi afero nin gvidas la kredo, ke niaj legantoj deziras kompreni tion, kion ili legas kaj la kreskanta populareco de nia gazeto kuraĝigas nin en tiu kredo. Ĉar *E.I.* estas oficiala organo de unu el la plej fortaj potencoj en la nuntempa Esperanto-movado, ni konscias la gravan rolon, kiun ĝi ludas kaj povos ludi en la sfero de lingvo-uzado.

La intermilitan periodon karakterizis ŝajna febro por kreado de ĉiam novaj radikoj, sufiksoj kaj vortformoj. Estis la modo uzi la plej laste aperintajn neologismojn, negrave ĉu tiuj estis saĝe elektitaj, kompreneblaj aŭ eĉ ĝustaj. Ni ne denove trafu en tiun eraron. La bela Zamenhofa stilo ne estas elmodiĝinta sed ankoraŭ kapablas esprimi multon, por kio oni serĉas kaj kreas novajn, tute ne necesajn esprimojn, kondiĉe nur ke oni studu tiun stilon. La ĝenerala uzado de Esperanto multe disvolviĝis dum la pasintaj kvardek jaroj sed multtrilate tiu kondiĉo estas valora kaj atentinda. En la kadro de la fundamenta stilo uzita de la Majstro kaj liaj samtempuloj oni povas des pli bone kaj bele disvolvi la propran individuon stilon, tiel aldonante novan belecon al la ĉiama belo de tiu klasika prozo. Necesas nur, ke ni *respektu nian lingvon!*

M.S.

## LA KUNRILATAJ VORTOJ EN ESPERANTO KAJ JAPANLINGVO

Tiuj, kiuj kritikas, kiel **nenaturajn kaj artefaritajn** la kunrilatajn vortojn en Esperanto eble ne scias, ke la sama sistemo ekzistas *tute nature* en la japana lingvo, kaj oni sendube trovas interesa la jenan komparan tabelon de kunrilataj vortoj en ambaŭ lingvoj. Mi ne scias, ĉu D-ro Zamenhof jam konis la japanan sistemon antaŭ ol krei la Esperantan, aŭ ĉu li elpensis ĝin nur laŭ la logiko, sed mi inklinas kredi al la lasta. Ĉiukaze kaj precipe en la dua okazo, ĝi estas ja plua pruvo de lia genio. Alia fakto ofte forgesata estas tio, ke eĉ la komencaj literoj kaj la radikoj de la Esperanta sistemo, almenaŭ grandaparte, devenas, kiel ĉiuj aliaj vortoj en la lingvo, de jam ekzistantaj **naturaj** lingvoj kaj ne estis tiom arbitre elpensitaj, kiom oni povus supozi.

Ne estante logike elpensita, la japana sistemo, kompreneble, ne estas tiel laŭregula kaj kompleta kiel la Esperanta, kaj kelkaj el la respondaj formoj ne ĉiam estas uzataj ĝuste kiel en Esperanto. Manko de respondaj vorto en la ĉi-suba tabelo tamen ne nepre signifas, ke tia ne ekzistas, sed nur, ke la kutima vorto ne formas parton de ĉi tiu sistemo. (Oni notu, tamen, ke la tiel nomitaj *Rilataj Pronomoj* ktp. tute ne troviĝas en la japana; ekz. por *La libro, kiun mi aĉetis hieraŭ, estas sur la tablo*, oni diras kvazaŭ *Mi hieraŭ aĉetis libro tablo-sur estas*; komparu Esperante, *La de mi hieraŭ aĉetita libro . . .*) *Ajn* estas tradukata per Demanda Formo plus de *mo*; tial *nan de mo* egalas *io ajn* krom *ĉio*.

Estas eble eĉ plireguligi la tabelon kiam oni konsideras la ideogramojn. Ekzemple kvankam por *ĉi tiam, tiam kaj kiam* oni **diras** *kono toki, sono toki kaj itsu*, oni laŭregule **skribas** signojn, kiuj laŭvorte signifas respektive *ĉi-tiufoje, tiufoje kaj kiufoje*.

Tiuj, kiuj deziras facile kaj rapide kontroli ĉi tiun komparon, trovas la plimulton el la japanaj formoj ĉi tie prezentitaj en du tabeloj latinliteraj de kunrilataj vortoj sur paĝoj 86-88 de *Colloquial Japanese* de W. M. McGovern.

ĉi tio KORE	tio SORE (1) ARE (2)	kio ? DORE } NANI }	io DORE }KA NANI }	ĉio DORE }DE MO NAN }	nenio DORE }MO (3) NANI }
ĉi tiu KONO (adj.) KORE (pron.)	tiu SONO, ANO KARE (4) SORE, ARE (5)	kiu ? DONO DARE DORE	iu — DARE }KA DORE }	ĉiu DONO . . DEMO DARE }DEMO DORE }	neniu DONO . . MO (3) DARE }MO (3) DORE }
ĉi ties KORE NO	ties KARE NO SORE }NO ARE }	kies ? DARE NO DORE NO	ies DARE KA NO DORE }KA NO NANI }	ĉies DARENO . DEMO DORENO . DEMO	nenies DARENO . . MO DORENO . . MO (3)
ĉi tia KONNA KŌ IU	tia SONNA, SŌ IU ANNA, Ā IU	kia ? DONNA, DŌ IU NAN NO	ia NANI KA	ĉia DONNA . . . DEMO	nenia DONNA . }MO NANNO . } (3)
ĉi tiam —	tiam —	kiam ? ITSU	iam ITSU KA	ĉiam ITSU DEMO	neniam —
ĉi tie KOKO KOCHI (RA)	tie SOKO SOCHIRA ASOKO ACHI (RA)	kie ? DOKO DOCHIRA	ie DOKO KA	ĉie DOKO DEMO	nenie DOKO MO (3)
ĉi tial KŌ IU WAKE DE	tial SŌ IU WAKE DE	kial ? DŌ IU WAKE DE NAZE	ial (DŌ IU WAKE KA SHIRANU GA)	ĉial —	nenial WAKE MO NAKU (6)
ĉi tiel KŌ (SHITE)	tiel SŌ (SHITE) Ā	kiel ? DŌ (SHITE)	ie DŌ KA	ĉiel DŌ DEMO	neniel DŌ (SHITE) MO (3)
ĉi tiom —	tiom —	kiom ? IKURA (sing.) IKUTSU (plur.)	iom IKURA KA SUKOSHI	ĉiom —	neniom SUKOSHI MO (3)

1. latine *iste*; 2. latine *ille*; 3. +negativa verbo; 4. persono; 5. aĵo; 6. *wake=kialo*: *naku=ne estante*.

“Lingvo”, *Aŭstralio*

**Klarigaj Vortoj pri la Pensologio**, de H. T. Hamblin. Broŝureto, No. 11 en la serio., Eld. F. W. Hipsley, 17 Abbot's Rd., Birmingham 14, Anglujo. Daŭrigo de la konata serio. Lingvo, kiel kutime, modela. Prezo ne montrita.

Ni ricevis 15-paĝan mimeografitan broŝuron, kun ilustraĵoj, kiu interese priskribas la belajojn de Okcidenta Virginio en Usono. Ĝin verkis kaj eldonis R. W. Ruff, St. Albans, W. Virginia, Usono. Prezo ne montrita.

# LA PETSKRIBO

Kvankam ankoraŭ estas tre frue ni ne dubas, ke niaj legantoj kaj kunlaborantoj atendas kun granda intereso ian raporton pri la petskribo. De la komenco ni estas sufiĉe optimismaj por esperi, ke la entrepreno sukcesos kaj samtempe alportos multan bonon al la tuta Esperanto-movado. Dum unu monato la subskribitaj folioj venas en la oficejon kaj la indikoj estas, ke nia iniciato trafis eĥon en la koroj de ĉiuj sinceraj samideanoj. La sumon de la jam klasifikitaj folioj (preskaŭ dek mil) ni povas rigardi kun kontento kaj la kunlaborantaj organizaĵoj kaj samideanoj meritas gratulon pro tio, ke ili tiel rapide ekagis.

Kelkajn punktojn ni deziras ĉi tie pri-trakti. En iuj rondoj, duboj estas esprimitaj pri la projekto—iuj rigardas ĝin kun iom da suspekto timante, ke tio eble estas nur propagando por IEL; aliaj opiniis, ke ni trorapidis kaj tial la afero nepre fuŝiĝos. Responde al tiu lasta ni diru nur, ke rapida agado ne necese signifas agon senpripensan nek senpreparan. Ni ja lernis el la milito! Ni citu nur, ke ĝis la fino de Marto ni havis informon pri **duonmiliono** da deklarfolioj jam presitaj, en 20 landoj! Kaj oni ankoraŭ presigas . . . !

Por respondi la unuan timon, ni deziras tre emfazi, ke nia rolo en ĉi tiu afero estas pure altruisma. Ni tute ne celas, nek deziras forŝteli de niaj kunlaborantaj organizaĵoj iliajn membrojn; ni tute ne pripensas nur la prestiĝon de IEL. Oni ne laboras en la kadro de IEL, sed tute memstare kun ni, por la bono de Esperanto, kaj en la fino kiam kulminos nia laboro, la petskribo estos transdonata al UNO en la nomo de ĉiuj kunlaborantaj organizaĵoj. Se iuj samideanoj volos aliĝi al ni, ni kompreneble ilin bonvenigos, sed ni ne deziras prosperi je la kosto de niaj kolegoj. La nomo de la koncerna kunlaboranta organizaĵo sin trovas sur ĉiu deklarfolio kaj estus neprudente supozi, ke individuoj sin turnus al la internacia organizaĵo prefere ol la pli proksima, pli bone konata, nacia aŭ faka organizaĵo.

Por pravigi nian supozon, ke la projekto helpas al la kunlaboranto, ni citu ke en Egiptujo oni sukcesis interesi 7 gazetojn pri la afero kaj sekve de artikoloj, nia Ĉefdelegito tie estas superŝtitita de leteroj kaj informpetoj!

Kaj nun kelkajn punktojn, kiujn bonvole atentu:

Ankoraŭ troviĝas en la oficejo multaj folioj ĝis nun ne klasifikeblaj ĉar la okupoj estas sole en nacia lingvo. Oni krajone indiku la okupon ankaŭ en Esperanto.

Atentu, ke la subskribo estu farita per inko.

Neniu kun malpli ol 18 jaroj subskribu. Kelkaj centoj da folioj perdiĝis en la poŝto sekve de neforta pakado. Prefere uzu ŝnureton.

Iuj kolektintoj multe helpis nin per grupigo laŭ okupoj antaŭ ol ekspedi al ni. Estus tre helpe se ĉiu, kiu ensendas multajn deklarilojn, same farus.

Jen la unuaj ciferoj klasifikitaj laŭ landoj kaj okupoj.

## Landoj

Aŭstralio ..	36	Kenjo ..	5
Aŭstrujo ..	1	Maroko ..	136
Brazilo ..	200	Norvegujo ..	3299
Britujo ..	1493	Palestino ..	6
Danujo ..	1	Polujo ..	1
Finnujo ..	1023	Portugalujo	1898
Francujo ..	74	Rodezio ..	1
Grekujo ..	50	Sieraleono ..	5
Hindujo ..	8	Usono ..	1
Hungarujo ..	48		
Islando ..	1099	sumo ..	9397
Kanado ..	12		

## Okupoj

Artistoj ..	73	Navigaciistoj	82
Delegitoj		Parlamentanoj	1
Komunumaj	2	Policistoj ..	83
Dentistoj ..	11	Presistoj ..	194
Desegnistoj	73	PTT-istoj ..	164
Dommastrinoj	1284	Religiistoj ..	24
Eduk-		Sciencistoj ..	61
Aŭtoritatuloj	6	Sindikateĉefoj	6
Elektristoj ..	95	Soldatoj ..	175
Farmaciistoj	31	Studentoj ..	653
Farmistoj ..	261	Ŝoforoj ..	140
Hotelistoj ..	51	Ŝtatoficistoj	219
Inĝenieroj ..	529	Teknistoj ..	13
Instruistoj ..	469	Termezuristoj	6
Juristoj ..	46	Transportistoj	558
Ĵurnalistoj ..	35	Urboficistoj	109
Komerclistoj	1796	Vendistoj ..	167
Konstruistoj	178	Vestistoj ..	85
Kuracistoj ..	152	Diversaj ..	550
Laboristoj ..	602		
Lingvistoj ..	15	sumo ..	9397
Metiistoj			
Diversaj	398		

Al ĉiuj dankon. Al la unua centmilo, antaŭen!

**Anonceto. Leterkunveno.** Bonvolu sendi poŝtkartojn kaj leterojn al Esperanta Grupo, Arras, Francujo, okaze de Norda Federacia Kongreso, la 16an de Junio.

# KONTROLO "GALLUP" EN FRANCUJO

Preskaŭ ĉiuj homoj aŭdis aludon pri la jam famaj kontroloj de publika opinio rilate iun temon, kiujn iniciatis en Usono iu S-ro Gallup (angle *Gallup Polls*). La celo de la kontrolo estas konstati kion opinias la homoj, kaj tio estas farata per pridemandado de unuopaj homoj el ĉiuj sociaj klasoj, el ĉiuj landpartoj kaj el ĉiuj okupoj, profesioj kaj metioj.

En Usono oni precipe celis antaŭdiveni la rezultojn de la tutlandaj voĉdonadoj, ĉar tio povas esti valora por iuj homoj, ekzemple grandentreprenistoj kaj simile, kies privatan politikon povas influi la politiko nacia. Analizinte la proporciojn de la respondoj ricevitaj kaj akceptinte tiujn kiel reprezentajn de la tuto la kontrolinto havis rimarkindan sukceson, kaj la kontroloj nun estas aplikataj al la plej diversaj celoj por konstati, kion opinias la homoj pri tiu aŭ alia afero.

Lastatempe oni aplikis la kontrol-sistemon en Francujo kun la celo ekkoni la sintenon de tiu popolo rilate Esperanton. Tio estas gravega afero kaj ni ne dubas, ke la detaloj estos por niaj legantoj aparte interesaj.

Jen la demando, kiun oni faris al la homoj: Ĉu vi opinias dezirinda la devigan instruadon de internacia lingvo, kia Esperanto, en la lernejoj de ĉiuj landoj?

## Rezulto de la Kontrolo

	<i>Jes</i>	<i>Ne</i>	<i>Sen opinio</i>
Urbanaj ..	63%	21%	16%
Kamparanoj	66%	20%	14%
Viroj ..	64%	20%	16%
Virinoj ..	65%	20%	15%
Do sume ..	65%	20%	15%

Ambaŭ sekcioj de la kontrolo (laŭ sekso kaj loko) donas preskaŭ saman dividon de proporcioj kaj tial oni rajtas konkludi ke ekzistas pri la demando kolektiva opinio favora al nia afero. Ni menciuj, ke la senopiniaj respondoj (15%) reprezentas sumon de indiferenteco, eĉ nescio, sed ne hazito.

## La Respondoj (Pozitivaj 65%)

La tono de ĉi tiuj respondoj ĝenerale estas entuziasma. Pri la bonaj rezultatoj kaj profitoj, kiuj sekvas, oni povas resumi ilin laŭ tri kategorioj:

1. Alproksimiĝo de popoloj kaj per tio sole malpli da ebleco de militoj (ĉi tiu ideo estis plej ofte esprimita).
2. Faciligado de vojaĝado kaj translokiĝoj alilanden.
3. Faciligado de internacia komerco.

(Ĉi tiuj du lastaj profitoj troviĝas malpli ofte en la respondoj ol la unua).

Tamen oni tre ofte esprimis dubojn kaj demandis: Ĉu tiu revo povos iam realiĝi?

Jen la tekstoj de kelkaj jesaj respondoj:

"Tio estus bona afero" (tre ofte).

"Mi scivolos, kial ĉi tiu malnova ideo neniam efektiviĝis".

"Tio estas unu el la rimedoj por forigi militon".

"Oni devus esti farinta tion post la milito 1914-18".

"Dezirinda? Certe. Efektivebla? Tio estas alia afero".

"Tio estus almenaŭ unu plia provo alproksimigi la homojn kaj valorus la penon".

"La homoj pli bone konus unuj la aliajn kaj malpli malamus unuj la aliajn".

"Estus bone provi tion".

"Antaŭ longe oni devus fari tion" (tre ofte).

"En tio eble kuŝas la sekreto pri la paco".

"Sed, de mia juneco mi aŭdas pri tio, kaj nenio eliras" (tre ofte).

"Kiam oni komprenas unu la alian, oni alproksimiĝas".

"Oni povus provi. Se tio ne donos bonon, ĝi ne povos fari malbonon".

"Kiam oni aŭdas lingvon, kiun oni ne komprenas, kolero naskiĝas".

## La Respondoj (Negativaj 20%)

Ili staras ĉirkaŭ la tri subaj ideoj (laŭ malgrandiĝanta ofteco).

1. Tio neniam sukcesos, la sperto pruvis tion.

Oni ne diskutas teoriajn efikojn de tia ideo, sed malkonsilas novajn eksperimentojn, ĉar tio kondukos al nenio.

2. Oni ellernu jam ekzistantan lingvon.

La homoj, kiuj donis tiajn respondojn, konservis la proponitan celon kaj ideon de internacia lingvo sed ne konsentis pri la elektita rimedo: ne elpensita lingvo, sed unu el la tradiciaj lingvoj. Tiurilate angla kaj franca lingvoj estis proponitaj.

3. Tio neniel utilas.

Tute negativa respondo. Tiaj estis malplej oftaj.

Jen la tekstoj de kelkaj respondoj:

"Infanoj jam havas tro multe da aferoj por lerni" (tre ofte).

"Tio neniel farus konkordon inter popoloj. Francoj jam parolas unu lingvon kaj ĉu oni povas paroli pri harmonio inter ili"?

"Per angla kaj franca lingvoj oni povas sin komprenigi sur tri kvaronoj de la mondo".



"Lerni elpensitan lingvon estas tiel same kiel proponi al mi naski infanon per arta gravedigo".

"Oni jam ellernu korekte la francan lingvon" (tre ofte).

"Vi devas demandi la lernantojn".

"Tio ne estas serioza".

"Tio estas utopio; ne malŝparu nian tempon".

### Statistiko kaj Analizado

(laŭ aĝo, riĉeco kaj politika kredo)

Aĝo	Jes	Ne *
Junuloj (20-34 jaraĵoj) ..	80%	20%
Mezaĝuloj (35-54 jaraĵoj) ..	75%	25%
Maljunuloj (55-70 jaraĵoj) ..	73%	27%

Oni rimarkas, ke kun la aĝo pligrandigas ankaŭ la skeptikeco pri la sukceso de tiu projekto. Tamen oni devas konfesi, ke la elreviĝo de maljuneco ne tiom evidentiĝas, kiom oni povus atendi.

Riĉeco	Jes	Ne
Malgranda .. ..	77%	23%
Meza .. ..	77%	23%
Granda .. ..	70%	30%

La riĉuloj klare apartiĝas kiel ne tiel favoraj al nia ideo, kiel la malpli riĉaj homoj. Tio supozeble devenas de la jena fakto, ke lernado de unu aŭ kelkaj lingvoj estas deviga por la infano de ĉi tiu socia klaso. Tial la oportuneco de ĉi tiu projekto estas por ili malpli evidenta.

### Politika Nuanco

	Jes	Ne
Ekstrema maldekstro .. ..	87%	13%
Maldekstro .. ..	78%	22%
Centro .. ..	68%	32%
Dekstro .. ..	62%	38%

La ideo de internacia lingvo evidente konvenas por la koncepto de politika internaciismo. Rimarkinda tamen estas la iom granda diferenco inter la ciferoj de la Ekstrema Maldekstro kaj la Maldekstro.

### Konkludoj

Laŭ la supre donitaj ciferoj, se ni akceptas ilin kiel reprezentajn de la tuto—kaj antaŭaj spertoj ĉe la kontroloj Gallup pravigas nin en tiu supozo—ni povas akcepti, ke en Francujo en la nuna momento la granda plimulto de la homoj favoras nian aferon. Granda parto de la popolo konfesas la utilecon de la ideo kaj la sola demando kiu ŝajne ankoraŭ staras antaŭ ili estas, ĉu la afero estas realigebla? Kelkaj, konsiderante la sperton de la pasinteco, opinias ke ne. Tamen la pli-

multo sin deklaras favora al la eksperimento, opiniante ke la rezultato pli ol kompensus ĉiujn penojn.

Restas nur atentigi al niaj francaj samideanoj ke jen estas bela okazo fari rikolton por nia afero. La grundo jam estas plugita. Necesas nur ke oni semu kaj semu konstante kaj espereble en la baldaŭa estonteco la ciferoj de tiu kontrolo estos tute pravigitaj.

### ESPERANTO KAJ ŜAKO

Jam en antaŭmilitaj jaroj multaj ŝakistoj interesiĝis pri Esperanto kaj uzis ĝin en sia korespondado kun eksterlandaj ŝakistoj. Dum kelkaj jaroj aperadis ankaŭ ŝakaj rubrikoj en diversaj Esperanto-gazetoj. Tiutempe ankaŭ sveda ŝakrevuo *Schackvärlden* enhavis dum kelke da jaroj en ĉiu numero 1-2 paĝojn en Esperanto. Ĝia Esperanto-fako, gvidita de S-ro T. Lindberg, organizis en 1932 la unuan korespondturniron de ŝakistoj-Esperantistoj. Ĝi estis tute sukcesa kaj ĝin sekvis ankoraŭ du turniroj sed la lasta ne estis finludita pro militeksplodo. Tiujn turnirojn partoprenis ŝakist-Esperantistoj el 9 landoj. Tamen oni devas atentigi, ke krom *Schackvärlden* atentis nin neniu oficiala ŝaka organizaĵo aŭ ŝaka revuo.

Nun danke al la laboro de sveda samideano, S-ro Erik Larsson en Traneberg, kiu estas turnirgvidanto de ICCA (International Correspondence Chess Association —Internacia Korespondŝaka Asocio), oni sukcesis starigi ĉe tiu asocio Esperantofakon. Tio estas grava sukceso ĉar preskaŭ ĉiuj centraj ŝakorganizaĵoj de la mondo estas anoj de ICCA.

ICCA organizas grandajn internaciajn turnirojn kaj enlandajn ludojn. Ĝi aperigas ĉiumonatan multobligitan bultenon kiu nun enhavas ankaŭ artikoletojn en Esperanto.

La Esperanto-fako de ICCA nun preparas ankaŭ siajn turnirojn per korespondado. Unue oni komencos turnirojn de unuopuloj, poste ankaŭ internaciajn turnirojn kun partioj el 6 homoj. Turniroj de unuopuloj komenciĝos en la somero. En ĉiu grupo estos 7 ŝakistoj. Oni atentos pri tio, ke en ĉiu grupo estu ŝakistoj el minimume 5 landoj. Oni povas jam aliĝi al tiuj turniroj. La kotizo estas 5 angl. ŝil. (oni pagos ĝin je invito kiam estos eble sendi monon eksterlanden). Aliĝojn sendu al S-ro T. Lindberg, Prässebo, Svedujo aŭ al turnirgvidanto de Esperanto-fako, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo. Ni ankaŭ preparas ŝakterminaron por eventuala publikigo. Ŝakist-Esperantistoj, helpu nin kaj kunlaboru!

D-ro V. Faigl, Ĉeĥoslovakujo

\* La procento de senopiniaj respondoj estas preskaŭ sama en ĉiuj kategorioj (15%). Ni donas nur la porporciojn de la esprimitaj opinioj. (rim. de red.)



**EL ĈEĤOSLOVAKUJO**



La 29an de Januaro okazis en Grand-hotelo de Mladá Boleslav festeno okaze de la finiĝinta kurso—Ĉe-metoda—gvidita de S-ro K. Šolc. En belege ornamita ĉambro estis organizita ekspozicio de Esperantaĵoj. La festenon partoprenis pli ol 100 homoj kaj pro manko de seĝoj kaj tabloj, pluraj venintoj ne povis eniri.

La festenon partoprenis multaj klub-representantoj el Praha, inkluzive de S-ro Šustr, prezidanto de Esperanto-klubo Praha, radioparolanto Ant. Slanina, S-ro Molnar, kaj aliaj.

Post solena malfermo, farita de S-ro Šolc, oni prezentis amuzan programon, kiu daŭris ĝis la noktomezo. Invitite de S-ro Slanina, la samideanoj sin prezentis al la pli vasta mondo, per la mikrofono de Radio Praha. El la festeno, kiu vere similis kongreson, estis sendita salut-telegramo al la Prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, D-ro Eduard Beneš.

La Verda Stacio, antaŭe en Brno, translokiĝis al Praha kaj tie profesiaj geaktorj nun lernas Esperanton tiel, ke baldaŭ oni espereble povos aŭdi ilin antaŭ la mikrofono.

*K. Šolc, Ĉeĥoslovakujo*

**EL BRITUJO**

Esp. Fed. de Lancashire kaj Cheshire, en Britujo, faris propagandan laboron por Esp. pere de rezolucio, kiun ĝi adresis al ĉiuj parlamentanoj en sia federacia regiono, ĝis nombro de 71. Krom tiuj, ricevis kopion de la rezolucio ankaŭ Ĉef-Ministro Atlee, S-ro Bevin, F-ino Ellen Wilkinson (Ministro por Eduko) kaj S-ro A. Eden, kiu dum enstataŭis S-ron Churchill.

Tridek respondoj estis ricevitaj, el kiuj 16 definitive promesis subtenon, 3 estis kontraŭ, 5 promesis konsideri la aferon kaj la ceteraj estis nek por nek kontraŭ.

La ciferoj estas interesaj, kaj se la proporcio estas reprezenta de la tuto, oni povas supozi, ke en la Brita parlamento nuntempe sin trovas iom forta grupo favora al Esperanto.

*F. Parker*

**VEKIĜU NI !**

Unu el la plej gravaj difektoj de nia movado estas, laŭ mia opinio, la manko de taŭga propagando. Ni propagandas Esperanton en niaj gazetoj, en niaj lokaj kunvenoj, en niaj naciaj kaj internaciaj kongresoj. Ni ankaŭ propagandas nian lingvon metante verdan stelon sur la koverton kiam ni skribas al niaj samideanoj. Tamen inter kiuj ni propagandas nian ideon? Inter tiuj, kiuj jam estas fervoraj Esperantistoj! Tio estas sama afero, kiel doni medikamenton al sanuloj kaj lasi morti la malsanulojn.

Nia propagando ne sufiĉe transpasas la murojn de Esperantujo kaj la movado tro ofte restas en la mallarĝa medio de la loka grupo aŭ de la individua ano. La plimulto de la homoj nenion scias pri nia afero, kaj ofte tiuj kiuj ja scias, scias nur la opiniojn de la malamikoj de Esperanto, aŭ de la aliaj nesciantoj.

Ni bezonas en niaj vicaj novajn kaj entuziasmajn Esperantistojn: ni bezonas novajn varbantojn, kiuj fortigos nian movadon. Ĉiutage venas al ni novuloj, sed tio ne sufiĉas. Ni devas—kaj ni povas—varbi la junulojn. La junularo estas fekunda tero, kie rapide ĝermas ĉiu nova ideo. Ĉiu Esperantisto devas vekigi kaj eklabori!

Jen kelkaj proponoj:

1. Ni direktu nian propagadon al tiuj, kiuj ne estas Esperantistoj, sendante artikolojn tiucele al lokaj kaj naciaj gazetoj. Povos esti, ke la unua artikolo trafos en la paperkorbon; kaj la dua, kaj la tria. Ne gravas. Ni skribu ree kaj ree.

2. Anoncu en la gazetaro pri Esperantaj korespondkursoj. Tion oni povas fari en filmrevuoj, radiorevuoj k.s. Kompreneble, ni devos pagi pro tio, sed la rikolto bone repagos.

3. Amase skribu leterojn al la radiostacioj proponante la uzadon de Esperanto.

4. Sendu propagandmaterialon al junul-societoj, sportkluboj k.s.

5. Organizu dancojn kaj similajn festenojn en la nomo de Esperanto, celante la junulojn.

La agadkampo estas vasta kaj senlima; nur mankas energio kaj volo. Vekiĝu ni, ĉar jam temp' estas, kiel diris la majstro.

*M. Delgado, Anglujo*

## ALVOKO

Kiel amiko de nia literaturo certe vi ofte pensas pri *Literatura Mondo*. Vi certe scias, ke granda parto de tiu bela kaj espereble reviviĝonta revuo ligiĝis kun la urbo Budapeŝto, kie la redaktejo, presejo kaj granda parto de la kunlaborantoj vivis kaj—feliĉe—vivas. Pensu ankaŭ pri la hungara Esperantistaro, kiu ankaŭ cetere akiris tiom da parto kaj tiom da meritoj en la Esperanto-laboro. La bravaj hungaraj Esperantistoj vivas inter plorindaj cirkonstancoj sendepende de tio, kio estas ilia profesio. La subskribinto ricevis leteron kun februara dato. La lettersendinto raportis pri sia salajro, nekutime alta: 4 milionoj da pengoj monate. Sed la magistratoj povas regule prizorgi nur la panprovizion, kies taga porcio estas 150 gramoj da maizpano. Ĉio alia troviĝas en la nigra borso, kies prezoj estas gigantaj. Ekz. unu kg. da oleo (graso) 800,000 pengoj, unu kg. da sukero 1 miliono, virvesto 10 milionoj ktp.

Oni malsatas en Budapeŝto kaj supozeble en la tuta lando, precipe en la urboj. Tiu letero donis al mi impulson, ofte pripensitan, ke mi kiel eksterlande loĝanta hungara laboranto de la Esperanto-movado turnu min al ĉiulandaj Esperantistoj kun la insista peto: De ĉie, kie oni povas sendi nutraĵojn kaj eventuale manĝaĵojn al la hungaraj amikoj, oni tuj faru ion por la mildigo de la nepriskribebla mizero.

Kompreneble la maniero povas kaŭzi malfacilaĵojn. Por mencii ekzemplon, mi povas vin informi, ke el Svedlando estas ebleco sendi pakaĵojn kaj ĉi tie ni organizas helpagadon tiel, ke la samideanoj ensendu laŭeble monsumojn, kiujn la komitato ĉi tieca uzas por la aĉeto de nutraĵoj. La unua malfacilaĵo do povas esti la sendo de la pakaĵoj. En Svedlando la helpagado aliĝas al tiuj transportoj, kiujn la Ruĝa Kruco aŭ aliaj altruismaj organizoj ekirigas al Hungario. Mia propono estas do: bonvolu en via rondo iniciati rapidan ekfunkciigon de komitato kiu interrilatiĝos kun la funkciuloj de la altruismaj organizoj kaj informiĝos pri la eblecoj de la sendado. Tuj poste oni povos aranĝi la kolektadojn kaj kontinue sendi la pakaĵojn, se estas entute ebleco pri plurfoja sendado. Estas grave rapide agi kaj rapide prizorgi la sendadon.

La alia demando estas: Kiel prizorgi la disdonadon? Kvankam mi ankoraŭ ne havas informon pri tio, mi estas tute certa, ke la hungaraj samideanoj akceptos tian aranĝon, ke la donacoj alvenu al la adreso de S-ro Bela Bleier, la frato de la mortinta administracia ĉefo de *Literatura Mondo*,

Hargitta u 10, Pestszentlőrincz, Hungarujo, kie 4-membra komitato: S-roj Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Paŭlo Balkányi kaj Bela Bleier decidus pri la disdono de la donacoj. Pri tio en kontakto kun la svedaj sendaĵoj mi jam skribis al Budapeŝto kaj certe la afero ne havos malhelpon, la menciitaj s-anoj vivas kaj certe volonte kunagos. Oni povas imagi ankaŭ persone adresitajn pakaĵojn, sed tio havus tiun malavantaĝon, ke per ili nur la plej konataj s-anoj estus plurfoje favorataj kaj la celo estas la laŭeble plej ampleksa helpo.

Mi scias, ke la tuta mondo baraktas en mizero kaj ke estas multaj lokoj, landoj, kie la helpo estas urĝa, sed mi esperas, ke en tiuj landoj kaj lokoj, kie ekzistas ebleco por helpo, oni trovos manieron por malpliigi ankaŭ la mizeron de la hungara samideanaro.

*D-ro Ferenc Szilágyi, Svedlando*

*Rim. de Red.*—Pro la multaj komplikaj reguloj tiurilate, sendontoj nepre sin informu ĉe la poŝtoŝeĉejo pri tio, kion oni rajtas sendi eksterlanden.

Notu ankaŭ, ke en la plimulto de landoj estas lege malpermesate sendi monon eksterlanden.

## FAKMOVADOJ

La artikolo pri fakmovado (Januaro, 1946) estas interesa kaj gravega. Mi volus aldoni nur du-tri sugestojn. En la listo de sugestitaj revuoj, ne estas loko por ludoj, flankokupoj, sportoj k.t.p. (de ŝako ĝis bovbatalo). Ĉu tio ne estas manko? Kvina revuo por tiuj ĉi aferoj povus enhavi ankaŭ la filatelon—kiu ŝajnas malfeliĉa ĉe la P.T.T.—la filmojn, kaj eble la fotografadon. Tio estas negrava. Kio vere estas grava, estas ke ĉiu tra la mondo, kiu volas eldoni fakrevuon, devas demandi al si: "Ĉu mi, kaj mi sole en la mondo, rajtas esti la redaktoro? Ĉu mia revuo havos sufiĉan monbazon, sufiĉajn spertulojn, por bone vivi?" Oni ne diru nur, "Ĉu ĝi kreskos?" sed, "Ĉu ĝi estos inda je la Esperanta movado?"

Ĉu E.I. povus eldoni liston de tramondaj Esperanto-fakrevuoj? Se jes, la redaktoroj povus interkorespondadi por kunigi laŭ ebleco, kaj—pli grave—novuloj povus decidi, ĉu iliaj projektataj revuoj vere estos helpemaj al nia movado.

La alvoko estas klara: ĉu la individuo altruisme konsentos forgesi sin por la bono de ĉiuj?

*L. G. Horsefield, Anglujo*

## RECENZOJ

\* = akireblaj ĉe I.E.L.

\***Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo** : speciala presajo memoriga de la 10a Brazila Kongreso de Esperanto, eldonita de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, 1945. Paĝoj 151 (27.5 × 19cm.) Bele bindita, 13s. 6p., afranko 6p.

Antaŭ kelke da monatoj oni raportis pri tiu ĉi kongreso, kiu signis la postmilitan ekagadon pri kaj por nia lingvo. Jen volumo unue prezentita al la kongresanoj kiel bela memorigaĵo de Brazilo, tamen nun havebla en bela bindaĵo. Ĝi estas kolekto de 36 artikoloj *Originaloj el la Brazila Revuo de Geografio* de ok verkistoj, kaj la traduko estas de sep Brazilaj Esperantistoj. Ĉiu artikolo havas tutegan klaran desegnaĵon, kiu bone ilustras la temon. Ŝajnas ke la desegnaĵoj estas plejparte el fotografaĵoj. Eĉ oni legas sur p. 138, ke la 33a estas bazita sur fotografaĵo farita el aviadilo. Kun escepto de du ili portas subskribon *Percy Lau*; sur N-oj 2 kaj 3 mi ne trovas subskribon, sed ĉiuj ŝajnas esti faritaj de la sama mano. Ĉiu donas tre klaran ideon pri la esenco de la bildo, esenco kiu ofte ne estas facile trovebla en fotografaĵo, kiu montras nur ĉion viditan de la fotografilo. Gratulon al la artisto.

Tial la volumo estas verko de multaj homoj. Ĝi donas bildojn de popoloj multnombraj kaj diversdevenaj en vasta lando. Brazilo estas eble la tria lando en la mondo laŭ areo kontinua, malpli nur ol Sovetunio kaj Kanado. La lando etendiĝas latitudo tra ekvatora, tropika kaj subtropika zonoj, kaj vertikale de marnivelo ĝis iom malpli ol tri mil metroj super la marnivelo. La ebenaĵo de la Amazono estas tre malalta tereno. Aliaj partoj estas sur plataĵo precipe je meza alteco de 300 ĝis 1000 metroj kun grava kvankam negranda areo inter mil kaj du mil metroj. La klimato estas ĉie varmaj aŭ varmegaj sen ia malvarma sezono, kaj iliaj diferencoj estas laŭ la kvanto kaj sezono de la pluvo. Pro tio estas granda diferenco inter la vegetaĵaro—de duondezerto ĝis densega pluvbaro. Dek kvar artikoloj priskribas tipojn de vegetaĵoj, du priskribas kulturistojn pri specialaj kreskaĵoj kaj kvin pritraktas bovgardistojn en apartaj regionoj, kiuj diferencas inter si laŭ adapto al vegetaĵaro. Oni notas, ke en la *Caatinga* la bovgardisto sin vestas en ledo por protekti sin kontraŭ la dorĵoj. Ĉia adapto al vegetaĵo estas signifa kaj interesa kaj la aŭtoroj indikas ĝian gravecon en Brazilo per la fakto, ke ili dediĉas al tio pli ol duonon de la volumo.

Ĉiu artikolo kontribuas al imago de Brazilo en la menso de la leganto aŭ per nova scio aŭ per freŝa vidpunkto. Mi trovis tre interesaj la priskribojn pri mateo, kiu estas la teo de Sudameriko, kaj la amplekso de la materalbaro kaj la laboro necesa por la produktado. En la puntistinoj ni trovas postsignojn de malnova Portugalujo. La dresado de bovo kiel rajdbesto sur insulo Marajo estas adapto al novaj kondiĉoj. Entute oni prezentas al la leganto vigan vivadon.

Brazilo estas, pli ol iu ajn lando, miksejo de popoloj. Tamen nur unu artikolo, *Negrinoj en Bahia*, kaj disaj frazoj aliloke, tuŝas ĉi tiun gravan aspekton de la lando. Ankaŭ Brazilo enhavas, krom la vasta internlando priskribita, almenaŭ tri modernajn urbeĝojn kaj multajn urbojn en kiuj centriĝas granda parto de la vivo kaj industrio; tamen la urbojn oni ne pritraktas. La libro donas al ni tre allogajn kaj pitoreskajn ekvidojn de vasta lando, ĉefe pri ĝia pli simpla vivo sur kamparoj kaj arbaroj.

Pri la nomoj geografiaj estas bedaŭrinde, ke la verkistoj (aŭ la tradukistoj) ne akceptis la regulojn de la Internacia Mapo Milionona. Laŭ tio la enlanda formo donas la radikon. Tial oni devus skribi *Brasil* anstataŭ la anglalingva formo *Brazil*. La lingvo ĝenerale estas bona, sed tro ofte ĝi difektiĝas per preseraroj, kiuj en Esperanto povas esti tre konfuzaj. —ekzemple sur paĝoj 117 kaj 142 estas radikoj *grejs*; ĉi tion mi ne trovis en miaj vortaroj, sed post icm da pripensoj kaj relegado mi konkludis, ke tio estis preseraro kaj devus esti *gnejs*. Por homo, kiu havas nenian konon pri la geologio, ĝi povus esti tute nekomprenbla.

La volumo estas presita tre bonforme kaj sur bona papero, kiu tre klare montras la ilustraĵojn. Ni ŝuldas dankon kaj gratulojn al niaj Brazilaj samideanoj pri ĝi.  
C.B.F.

\***Enkonduko** en la studadon de la Spiritisma Doktrino: el *La Libro de la Spiritoj* de Allan Kardec. El Franca lingvo trad. P.C.N. Eld. Livraria Editora da Federação E. Brasileira. Prezo 1 ŝil.

La titolo de ĉi tiu elĉerpaĵo el la mondfama *Libro* de Kardec klarigas ĝian temon, kiel ankaŭ la celon. La intenco de la aŭtoro estas konduki la interesaton paŝon post paŝo tra la labirinto de terminoj, difinoj, manifestaĵoj kaj simile al tuta kompreno pri la bazaj principoj de la doktrino de spiritismo. En tio li bone

sukcesas. Neligante min kun la konkludoj, kiujn li proponas el sia rezonado, mi allasas, ke li prezentas unu el la plej atentindaj kaj plej bone konstruitaj analizoj de la kontraŭargumentoj pri tiu doktrino, kiun mi iam ajn legis.

Kvankam li ekzamenas kelkajn kritikojn el la skolo de la moderna psikologio, mi sentas, ke estas domaĝe, ke li ne pritraktas unu el la plej gravaj aferoj, nome la nekonscian sinhipnotigon. La kapablo de hipnotiĝinto sin identigi kun multaj kaj tre diversaj personecoj estas konata kaj pruvebla fakto. Tio ne refutas la ĝeneralan koncepton de la aŭtoro, sed nur la aserton, ke unu medio ne povus senerare ripeti kaj riperiti iujn voĉtonojn kaj skribmanierojn. En hipnota stato oni povas plej fidele ripeti kion ajn.

Tamen por la nescianto, kiu deziras ricevi gvidon pri la doktrino, ĉi tiu *Enkonduko* estas tre taŭga, kvankam neniu libro povas anstataŭi senperan esploradon.

Pri unu afero mi estas tre kontenta : la lingvo estas modela. Malofte oni povas en la nuna tempo legi Esperanton tiel simplastilan kaj klare kompreneblan. La tro modesta tradukinto meritas ĉian laŭdon kaj se—kiel ŝajnas tre verŝajne—oni eldonos la tutan *Libron*, kondiĉe ke la stilnivele restos la sama, ĝi estos valora kontribuo al la Esperanta literaturo.

*Mason Stultard, Anglujo*

\***Pasko**: danlingva orig. de Martinus: trad. Th. Hammarlund. Eld. Livets Bogs Bureau, Kopenhago. 74 paĝoj (22.5 × 15cm.) Bind 4s. 6p., afranko 6p.

Mi legis ĉi tiun verkon kun kontento kaj kun granda bedaŭro—kontento, pri la apero de tia praktika pruvo pri la utileco de Esperanto kaj ĝia alpreniĝo flanke de grava organizaĵo; kaj bedaŭro, ke tiel belan produktaĵon makulas Esperanta traduko, kiu multe deprenas de la literatura valoro de la verko.

Supezble Martinus kaj liaj disĉiploj ne konsentus pri mia difino *religia* rilate ilian movadon; kaj religia en la senco *sekta* ĝi ne estas. Tamen la alte morala kaj etika koncepto de Martinus lasas nenian dubon pri la vere religia karaktero de la movado kaj pri la profunde religiaj konceptoj, kiuj motivigas la laboron de ĉi tiu nova predikanto pri eternaj kaj fundamentaj veroj.

Tamen la religi-filozofiaj konceptoj de Martinus tute ne estas novaj, almenaŭ rilate Britujon kaj Usonon. De kiam Annie Besant publikigis kaj disvastigis sub la nomo Teozofio la esoterajn doktrinojn de Hindujo, ni vidas en la sekvantaj jaroj multajn variaĵojn de tiu unika—por okcidentuloj—filozofio. Pluraj ankoraŭ ekzistas kaj en Britujo kaj en Usono.

Tio ne deprenas de la valoro de la mesaĝo\* de Martinus por tiuj, kiuj trovas kontenton en tiuj studoj. En *Pasko* sin trovas elokventa pledado por la ideo de mond-savado pere de la krucumo de Jesuo, kaj rilate la konduton kaj vivon de la homoj, troviĝas konsilo pri la aplikado de konataj bazaj principoj por la atingo de la feliĉo.

Ke la organizaĵo de Martinus praktike uzas Esperanton kaj esperas per ĝi disvastigi sian movadon preter la landlimojn de Danujo devas esti ĝojiga novaĵo por ni.

Verŝajne ĉi tiu verko estas la unua el serio eldonota kaj pro tio estas domaĝe, eĉ tragedie, ke oni ne sufiĉe klopodis pri la literatura nivelo de la verko. Vortoj malĝuste uzitaj, estas *konvert* (*aliig-*) p.17 *reakcio* (*reago*) p.45 *plano* (*mondo, sfero*) multloke; *gvardisto* (*gvardiano*) multloke; *inaiguri* (*inici*) multloke; kelkfoje estas uzitaj, tute nenecese, koncentracio, demonstracio, manifestacio, kulminacio kaj la neologismoj *reinkarnacio* (*reenkorpiĝo*), *materialisacio* (*materiigo*), *inspiracio* (*inspiro*), *robusta* (*fortika*), *devocio* (*pieco*), *mentaleco* (*mensostato*), *galaksio* (*steletaro*). Efektive gramatikaj eraroj estas sufiĉe oftaj; *evol-* estas traktata tra la tuta verko kiel transitiva verbo; *buklumiginta haro* p.31 (-aj haroj); p.13 6-foja manko de -n; sur p.33 sin trovas perfekta ekzemplo, kiel **ne** uzi adverban particon; p.35 7-foje malĝusta uzo de -n.

Nekomprenebla estas la senescepta uzo de streketo inter *ĉi-tiu*, kaj la malgraŭzamenhafa *okulo por okulo* ktp.: ŝajne arbitra estas la divido per streketo de iuj kunigitaj vortoj. Tamen, la verko sendube trafos bonan akcepton ĉe la Esperanta publiko pro la mesaĝo, kiun ĝi enhavas.

*Mason Stultard, Anglujo*

## VANA ATENDO

Vane mi esperis ŝian venon—  
Pasas temp', forrestas amatin'.  
Ĝojan, helradian sunmatenon  
Jam detruis premo de l' destin'!

Daŭre kreskas mia maltrankvilo,  
Plilaŭtiĝas mia korobat'.  
Jam por mi silentas birda trilo  
Kaj angor' min skuas sen kompat'.

Sub verdaj' mi sidas vanatende,  
En anim' triumfas la aŭtun'  
Kaj el mia buŝo sonas plende  
Kant' pri malleviĝo de la sun'.

En kor' mia, peza, sol-ermita,  
Vibras, bruas, tondras la tumult';  
Mian kanton pri esper' trompita  
Rompdissone glutas plorsingult'...

*Lucien Laurat, Francujo*

\* mesaĝo=speciale komunikado.

## ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	18.10	Bern (Svisujo). 47.28m. Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco. Paroladetoj de D-ro Privat.
	21.30–21.45	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 49.92m. kaj ofte 1571m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Lundo	21.30–21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	21.50–22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.00–22.15	Varsovio (Polujo). 49.06m. Informoj. Pola Radio, Koszykowa 8, Varsovio.
Mardo	21.30–21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	21.50–22.00	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj. Radio Moravska Ostrava.
Merkredo	16.00	Sofio (Bulgarujo). 352m. Parolado.
	21.30–21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	15.10–15.30	Sveda Radio. 19.80m. Esperanto-programo. Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm. Nur je la 16a de majo.
	21.30–21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	21.50–22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	01.10–01.30	Sveda Radio. 31.46m. kaj 49.46m. Ripeto de la ĵaŭda programo por ekstereŭropaj landoj. Nur je la 17a de majo.
	14.45 (?)	WRJN Racine (Wisconsin, Usono). Parolado, muziko, kurso. S-ro S. Klukowski, 3233 S. Springfield Avenue, Milwaukee 7, Wisconsin. Pluaj detaloj mankas.
	20.30–20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
	21.25 (?)	EAJ 14 (Hispanujo). 200m. Kurso.
	21.30–21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
Sabato	18.30–18.45(?)	3 SR (Aŭstralio). 238m. Novaĵoj. Nur je la dua sabato de ĉiu monato.
	19.00–19.45(?)	PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	20.00–20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.
	21.30–21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).

**Klarigoj**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Mez-Eŭropa kaj Brita somera tempoj oni aldonu unu horon. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuletterojn kaj informojn pri ricevado.

## PRESISTOJ KAJ KOMPOSTISTOJ

Tro malmulte estas sciata ĉe la Nederlanda popolo, kaj eĉ inter la anoj de la kontraŭleĝa movado (kiu rezistis la agojn de la okupintoj de Nederlando) kiom valoris la laboro de la liberamaj Nederlandaj presistoj. Estas trafe rimarki, ke laŭ la grado ke tia laboro fariĝis pli malfacila kaj pli danĝera, la volontularo sur tiu fronto pli kaj pli kreskis anstataŭ plimalgrandiĝi. En la unua jaro de la okupado preskaŭ ne estis eble trovi presiston kiu faros la kontraŭleĝan laboron. Poste jam estis multaj presistoj.

Se Nederlando ne havus tiajn kuraĝajn homojn, la rezista movado ne fariĝus tia, kia ĝi estis: nome el kelkhoma afero ĝis vivtasko por centoj, miloj, eĉ dekmiloj da homoj. Malgraŭ la sufiĉe singarda laboro, ili havis multajn riskojn. Ili ne povis en momento kaŝi la maŝinojn, nek per manturno malaperigi la grandajn pakajojn da presajoj. Dum la kompostado ili estis facile kaptebla ĉasajo por la S.D. (speco de Germana polico). En okazo de kaptado, neado aŭ senkulpigado ne povis savi ilin.

Tiuj, kiuj laboris kun ili, scias, kion tio signifis—paki, faldi kaj ekspedi pli ol 100 kilogramojn pezantan kompostojn, centojn da kilogramoj da papero, la nervostreĉajn momentojn dum la transportado el la presejoj, kaj se oni laboris dumnokte, la timon ke strieto de lumo elradios, ke la bruo estos tro forta. La presistoj vivis en tuta izoleco, ĉar neniu sciis la grandan misteron, kiu okupas ilin konstante. Ili ne povis paroli pri sia laboro al iu ajn, nur de tempo al tempo kun unu el la kontraŭleĝaj laborantoj, kiuj vizitis ilin (kontakto kiu ĝenerale limiĝis je unu el la plej fidindaj personoj, unu, malofte du . . .)

Vere ili uzis la presilon por la plej bela kaj alta idealo, nome, alporti fidindajn sciigojn kaj informojn pri la vero kaj justeco inter la piedprematan popolon, kiu bezonis tion pli ol panon.

*Libera Nederlando* povas danke memori, ke eĉ ne unu presisto sia rekte pro laboro por L.N. perdis la vivon, kvankam presisto Balk en Roterdamo, kiu presis por la pli malpli memstara LN-grupo tie en la unuaj monatoj de 1941, estis mortpafita 23an de Februaro.

Ĝenerale la presistoj laboris por diversaj gazetoj, kaj samtempe pretigis ĉian rezistan presaĵon, ekzemple librojn, bildojn, poemojn, flugfoliojn kaj tiel plu.

La armeo de kontraŭleĝaj presistoj fakte estis tro malgranda por porti la daŭre pli kaj pli vastiĝantan gazetaron kaj poste la tutlandan rezistlaboron kun ĝia multego da komunikajoj kaj flugfolioj.

Inter tiuj, kiuj neniam hezitis doni sian forton kaj riski sian vivon kaj havon por la liberiga movado, estis A. J. W. Honing presisto-bindisto en Amsterdam. Saĝe, kuraĝe, trankvile kaj plenfide li faris sian laboron kaj eĉ pli ol tion. Li estis la unua presisto de la *Geuzeniedboek*, presisto de multaj kontraŭleĝaj gazetoj kaj verkaĵoj. La 20an de Marto 1944 li estis arestata. Tiam li havis la agon de 53 jaroj. Jam ne juna, sed lia laboro kaj sinteno junigis la Nederlandan popolon. Li mortis en Germanujo pro elĉerpigo, la San de Aprilo 1945.

De sama simpla grandeco estis la fratoj Gerrit kaj Jan Vergeer en Woerden Ankaŭ ili ne estis junaj—51- kaj 52-jaraj Malvarmsange ĝis nekredibleco, ili disponigis sian presejon tute en la servo de la patriota agado. Timi pri propra sorto ili ne sciis, kaj eĉ post la morto de siaj edzo kaj bofrato, la vidvino skribis al unu niaj kunlaborantoj, kiu ofte vizitis la presejon: *Kiom ofte ni embarasiĝas pri vi . . .* Tiom korpura, ke ĉiu honoro superfluas. Ke ili vivis inter nia popolo, nin ofte gardis kontraŭ malespero en la nigraj tagoj kaj eĉ hodiaŭ, ŝajnigas al ni, kiuj postrestas, ke ni postrestas en puro kaj amo.

La samo valoras por S. J. P. Bakker, posedanto de presejo en Amsterdam. Silentema Frislandano, sed iu, pri kiu la S.D. rimarkigis ke li kun siaj parencoj ŝajne faras *Privatkrieg* (privatan militon) kontraŭ Germanujon. El liaj parencoj ankaŭ du kuzoj estis mortpafitaj kaj multaj aliaj parencoj estis dum longa tempo en malliberejo. Jam en 1941 li presis multajn flugfoliojn por iu interreligia grupo, kiu precipe en la komenco de la milito montris fortan agadon. En la fino de la milito li preskaŭ ĉiutage presis gazetojn por *Trouw* (Fidelo) kaj L.N. Tion li faris ne pro aventuro ĉar li estis tre singarda homo, kiu ĉiufoje antaŭ ol ekpresi devis venki siajn skrupulojn internajn. Tion li faris per sia konvinko, ke tio kion li faras estas obeo al la ordono de Dia Volo. Tiel li mem atestis kaj tion li kuraĝe ripetis starante antaŭ la fimurdistoj. La 29an de Januaro 1945 li estis arestita kune kun siaj fidelaj helpantoj, kiuj pro amo al la bona afero faris ne malpli ol sia mastro. Ĉiuj estis mortpafitaj en Zaandam en la 29a de Februaro 1945.

Kamaradoj en la presejoj, vi kiuj dum la okupado estis niaj plej fervoraj kaj fidelaj helpantoj, hodiaŭ *Libera Nederlando* estas presata per modernaj rotacimaŝinoj, sed kelkfoje kiam ni vidas la ekzemplerojn facile kaj neĝenate glieti el la maŝinoj, kaptas nin la kordoloro kaj lace ni deturnas



nin. Tiam enpense ni vidas vin en la duonlumo, sen sufiĉe da teknika ekipaĵo, ĉe la kompostotablo kaj super la malgranda presilo, kiu ofte per manforto estis funkciigata ĉar elektra kurento estis ĉesigita. Kiom vi malhavis! Sed kiom fortaj estis viaj dediĉo kaj kredo en la justeco de nia komuna afero, kredo kiu montrigis pli forta ol la tuta Germana militmaŝino . . .

*El "Vrij Nederland" kun permeso  
Esperantigis*

*H. H. ten Hagen, Nederlando*

### La 37a jarkunveno de CENTRA DANA ESPERANTISTA LIGO

Dum la Pentekosto la danaj Esperantistoj renkontiĝos en la urbo HOLBAEK por labori por nia afero kaj por ĝui kamaradan kuneston. La unuan tagon de Pentekosto je la 11a horo la jarkunveno estos solene malfermata pere de urbestro ALFRED HANSEN en la kongresejo "Hotel Isefjord". Poste okazos ĝeneral-kunveno de la centra ligo kaj vespere komuna manĝado kaj festaranĝoj. La duan tagon de Pentekosto oni ekskursos ŝipe al la idilia insulo ORØ.

Oni atendas multajn partoprenontojn kaj esperas, ke ankaŭ eksterlandanoj ĉestos. Ĉiuj estos kore bonvenataj.

Same ni tre ŝatos eksterlandajn salutojn. Por la komitato

*Holger Hansen, Ringstedvej 17,  
HOLBAEK, Danujo*

### FORMORTIS ĤIMERO . . .

Denove ekregas malhelo :

Formortis ĥimer'.

Disfalis aera kastelo

De mia esper'.

Aera kastel' konstruita

Dum sonĝa spekul'

Per forto mirinda kaj mita

De via okul'.

Ĝin devis firmigi amsento

Kaj ama sopir'.

Sed estas maltaŭga cemento

Esper' kaj dezir'.

Esper' kaj dezir' ?—Vanamuzo,

Opia ebri' !

Tro baldaŭ jam venas rifuzo

Kaj amagoni'.

Refoje min plore ekskuas

Infera sufer'.

Kaj ree korsango ekfluas . . .

Formortis ĥimer'.

*Lucien Laurat, Francujo*

### PRI NOV-ZELANDO

Mi volas skribi por vi kelkajn faktojn pri Nov-Zelando. De tempo al tempo ni ricevas tre strangajn leterojn de aliandaj Esperantistoj. Iuj demandas al ni, "Kian lingvon vi parolas?" Aliaj demandas, "Ĉu vi estas Kristanoj?" Tiaj demandoj vekas nian miron. Kia popolo oni supozas, ke ni estas? Ĉu maorioj?

Loĝas en Nov-Zelando proksimume miliono kvincent mil homoj, el kiuj nur kelkaj miloj estas maorioj. La ceteraj estas plejparte Britoj, kiuj naskiĝis en Nov-Zelando. Oni povus travivi la tutan vivon sen renkontiĝo kun maorioj, kiuj loĝas plejparte en la kamparo. Ili estas tamen amindaj boneguloj kaj niaj amikoj. Ili ĝuas la samajn politikajn rajtojn, kiujn ni mem ĝuas, kaj ili havas kvar reprezentantojn en la Nov-Zelanda parlamento. Ili posedas rajtojn, kiujn ni Britoj ne posedas, precipe rilate al la arbaroj, la fiŝkaptado kaj la kolektado de ostroj.

Nia lingvo estas ĉie la angla kaj multe da maorioj ne scias la maorian lingvon, kvankam ni kuraĝigas ilin ĝin lerni kaj ĝin uzi.

Kvankam ni estas brita popolo, nia lando estas laŭleĝe tute memstara kaj sendependa. Niaj solaj kunligiloj kun Britujo estas nia komuna reĝo, nia personigas por ni la komunan britan senton, la komerco, kaj la amo aŭ estimo, kiun sentas bona kaj memstara filo al la gepatroj.

Niaj urboj similas al aliaj modernaj urboj, kun belaj stratoj el betono, altaj konstruaĵoj, elektraj tramoj, elektraj trajnoj, aŭtobusoj, aeroplanoj kaj tiel plu. La ĉefurbo estas Wellington (proks. 180,000) kaj la plej granda urbo estas Auckland (240,000). La precipaj industrioj estas la farmado de bovinoj aŭ de ŝafoj; estas ankaŭ multaj aliaj industrioj.

Ni estas plejparte Kristanoj de ĉiu subkredo.

La edukado estas deviga ĉe ĉiuj infanoj de la kvina jaro ĝis la dekkvina, kaj ni havas gimnaziojn kaj universitatojn. La eduko estas registara fako.

En la Norda Insulo ni neniam havas neĝon, sed la plej alta somera temperaturo estas proks. 85-90 gradoj Fahrenheit. En la arbaroj troviĝas nenia danĝera besto (krom eble la apro), preskaŭ nenia venena insekto, kaj nenia ajn serpento.

Kaj fine nia lando estas plena de belaĵoj, sportejoj, kaj naturaj fenomenoj—lagoj, riveroj, montoj, arbegoj, fjordoj, glaci-riveroj, gejzeroj, kalkŝtonaj kavernoj kun stalagmitoj kaj stalaktitoj, akvofaloj kaj varmaj fontoj.

*Nov-Zelandano*



# ENIGMO-KONKURSO N-ro 4

Por respondi al la leteroj de kelkaj ensendintoj, la jenon: Tiuj, kiuj ensendis enigmon, kiun mi poste aperigas en *E.T.*, kompreneble ricevos por tiu enigmo la fiksitaĵajn poentojn, same kiel tiuj, kiuj bone solvis ĝin. Laŭ peto de kelkaj solvantoj mi numerus la enigmojn. Kiel mi anoncis en la unua enigmo-konkurso, por la unua fojo estos disdonataj premioj post kontrolo de la tria serio de enigmoj. Ĉar mi ankaŭ al la malproksimaj membroj deziras doni la okazon partopreni la konkurson, mi akceptos provizore la solvojn ĝis tri monatoj post apero de la enigmoj (por Eŭropo du monatoj). Tial mi por la unua fojo povos publikigi la liston de la gajnintoj kun iliaj poentnombroj en la Aŭgusta numero. Tiam mi samtempe publikigos liston de dek malgajnintoj, kiuj restis kun la plej altaj poentnombroj post tiuj de la gajnintoj. Post la Aŭgusta numero ĉio regule aperos. Mi petas la solvantojn, ke ili aldonu antaŭ sia nomo la indikon *S-ino*, *F-ino* aŭ *S-ro*. En la venonta numero aperos nur krucvortoenigmo, ĉar la disponebla spaco estas nesufiĉa por samtempe aperigi aliajn. Solvojn de la enigmoj oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 2.

## El du faru unu

skarlatino, ekonomio, banderolo, iluminado, respubliko, doganisto, okulvitro, triviala, reciproka, operacio, bierglaso, eklabori, karbonado, artikolo, sakristio, limonado, arestigo, kompanio, arseniko, terebinto, oficisto, narkotiko, ĝardenisto, intervalo, viadukto, ekzameno, karikaturo, antilopo, suneklipso.

Se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas.

## Litergrup-enigmo

kolektiva, obstrukco, margarino, esperanto, nekropolo, ceremonio, optimisto, bataliono, ortodoksa, navigacio, aŭtokrato, leksikono, atmosfero, burokrato, originalo, rezultato, okcidento, difterito, uzurpisto, objektiva, nekrologo, argumento.

Komenco bona, laboro duona.

## Ĉifra-enigmo

Kion celas la esperantista movado? Ĝi celas atingi reciprokan komprenadon inter ĉiuj homoj kaj popoloj. Por kio ni bezonas tian reciprokan komprenadon? Kiaj estas la sekvoj, kiujn ni atendas de ĝi? Kial ni deziras, ke ĝi estu nepre sur fundamento neŭtrala? Kial ni tiel persiste laboras por ĝi? Kia estas la spirito, kiu nin ĉiujn ligas inter ni? Pri ĉio ĉi tio mi

jam multe parolis, kaj mi ne volas nun ripeti miajn vortojn, des pli, ke ĉiu el vi post kelka meditado facile mem trovos la respondojn. Antaŭ vi, praktikaj amerikanoj, mi volas analizi alian demandon, nome: ĉu ni kun nia laborado staras sur vojo tute certa, aŭ ĉu ni povas timi, ke iam nia tuta laborado montriĝos vana? Nur plena konscio pri la irota vojo donas al la marŝantoj sufiĉe da energio, por kontraŭbatali ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj troviĝas sur la vojo.

Sesa kongreso 1910 en Washington.

## Enigmo N-ro 10

Faru kiel eble plej multe da oficialaj nederivitaj substantivoj kvinliteraj (aŭ pli grandaj) per la literoj de la vorto UNIVERSITATO. La vortoj, do, povas enhavi du literojn "i" aŭ "t" sed ne du literojn "o", ĉar tiuj ne troviĝas en la vorto "universitato".

Po unu poento por ĉiu kompleta deko da vortoj. Por ĉiu aparta vorto pli ol sesdek, po unu poento.

## Enigmo N-ro 11

lozaĝo - ĝojigas - gastigi - gigantaj - tajloro - romano - nobelo. Jen ĉeno el trisilabaj vortoj, el kiu ĉiu vorto komenciĝas per la lasta silabo de la tuj antaŭa vorto. La unua vorto komenciĝas per la lasta silabo de la lasta vorto. La komencsilabo estas ĉiuj diferencaj. La vortoj devas troviĝi en Plena Vortaro, aŭ devas esti derivitaj laŭ gramatika maniero el vortoj troviĝantaj en P.V. Faru tiamaniere ĉenon kiel eble plej longan.

Po unu poento por ĉiu kompleta deko da vortoj ĝis kvindek. Por ĉiu ekstra kvino, po unu poento pli.

## Enigmo N-ro 12

Donu kiel eble plej multe da oficialaj, nederivitaj trisilabaj vortoj, kiuj ĉiuj havas tri egalajn vokalojn. Ekzemple: agrabla, inviti, koloro.

Po unu poento por ĉiu kompleta deko da vortoj ĝis kvindek. Por ĉiu ekstra kvino, po unu poento pli.

**Lastmomente**—La Estraro de I.E.L. kunvenis je Pasko kaj raportis pri la kunveno aperos en nia venonta numero. Ni povas nun anonci, ke estas decidite ke la venonta Unversala Kongreso okazos en Svisujo en 1947.

# INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 181

OFICIALA INFORMILO

San Aprilo 1946

## NOVAJ DELEGITOJ

Notu, ke la jenaj informoj alvenis post la pretigo de la jarlibro.

### Aŭstrujo

**Knittelfeld.** D : D-ro A. Halbedl, Schmittgasse 17-II.

### Brazilo

**Cravinhos.** D : O. A. Stein, Caixa Postal 25, Cravinhos (C.M.), Est. São Paulo.

**Rio de Janeiro.** FD (Armeaj aferoj) : Majoro M. Campelo Nogueira, Caixa Postal 3755. Tel : 43.0026.

FD (Naĝaj aferoj) : F-ino P. Meira de Vasconcelos, Caixa Postal 3755. Tel : 27.1773.

FD (Piedkuracado) : F. Doblás Filho, Av. 13 de Maio 44-13and., S. 1303. Tel : 42.5731.

FD (Statistiko) : P. Mesquita Lara, Av. Franklin Roosevelt 166. Tel : 22.2051.

**Salvador.** FD (Dentistaj aferoj) : A. Senna, Rosário 126-Av. 7.

### Britujo

**Bridlington.** D : N. Booth, 68 Windsor Crescent.

FD (Turismo) : La D.

### Finnlando

**Lappeenranta.** D : U. A. Räsänen, Kivenkatu 28. Tel : 347.

**Messukylä.** D : V. Wilkman, Rautapelto 6.

### Francujo

**Brive la Gaillarde** (Corrèze). D : R. Valade, 3 rue de Lépinay.

**Perigueux** (Dordogne). D : R. Boucher, 59 rue Gambetta.

### Hispanujo

**Castellon de la Plana.** FD (Juro) : J. Guzmán Guzmán, Delegacion de Trabajo.

FD (Komerco) : A. Martínez González, San Francisco 15. Tel : 2107.

FD (Tekسادo kaj Radio) : J. Batiste Jornet, Alloza 189. Tel : 1264.

**Puente del Arzobispo.** D : M. Manteca López, Puente del Arzobispo (Toledo).

### Nederlando

**Hoensbroek** (Limburg). D : F-ino W. S. Goote, Akerstraat 52.

### Nov-Zelando

**Matamata.** D : T. E. McMillan, Hohaia Street. Tel : 176.

**Wellington.** FD (Radio) : D. A. MacGill, 96 Elizabeth Street, Wellington, F.I.

## SANĜO

### Nov-Zelando

**Auckland.** FD (Radio) : Vakas pro translokiĝo.

## NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

S-ro A. St. Lo Mellichamp, Peoria (Ill.), Usono.

S-ro E. Mila, Drancy (Seine), Francujo.

## PATRONOJ

22. S-ro N. C. Smith, Banbury, Anglujo.

23. S-ino J. M. Ravestein, 's Gravenhage, Nederlando.

## MEMBRO-SUBTENANTOJ

192. S-ino I. P. Hanks, Melbourne, Aŭstralio

193. S-ro E. S. Hanks, Melbourne, Aŭstralio

194. S-ro A. F. Doneis, Pharr, Texas, Usono

195. S-ro J. Eisele, St. Louis, Mo., Usono

196. S-ro E. C. Pollock, Montrose, Cal., Usono.

197. S-ro E. Reed, Los Angeles, Cal., Usono.

198. S-ro W. T. Williams, South Bend, Ind., Usono.

199. F-ino H. Wolff, San Francisco, Cal., Usono.

200. S-ro E. G. Dodge, Washington, D.C., Usono.

201. S-ro F. Mitschke, Paterson, N.J., Usono.

202. S-ro E. Jacques, La Louvière, Belgujo.

203. F-ino H. M. Ison, Braintree, Anglujo.

204. S-ro R. R. Tredgold, Horley, Anglujo.

205. S-ro W. J. Wilkins, London, Anglujo.

206. Prof. C. B. Fawcett, London, Anglujo.

207. S-ro F. H. Bereterbide, Buenos Aires, Argentino.

208. S-ro P. W. Baas, Amsterdam, Nederlando.

209. S-ro J. Schooleman, Rotterdam, Nederlando.

210. S-ro J. C. v. d. Elsen, Tilburg, Nederlando.

211. S-ino L. Böttcher-Reitsma, Leeuwarden, Nederlando.

212. F-ino M. Grizon, St. Leonard de Noblat, Francujo.

213. S-ro L. Helleboid, Viroflay, Francujo.

214. S-ro R. Listrat, Bedenac, Francujo.

215. S-ro J. Robertson, Bern, Svisujo.

216. S-ro H. Dodson, Willaston, Anglujo.

217. S-ro E. Aprosin, Torino, Italujo.

218. S-ro A. Carmo, Petrópolis, Brazilo.

219. S-ro M. J. Gaio, Rio de Janeiro, Brazilo.

220. S-ro J. Course, Coventry, Anglujo.  
 221. S-ro S. N. Bunch, Oklahoma City, Usono.  
 222. S-ro D. M. Earl, Detroit, Mich., Usono.

**DONACOJ** por helpi al la forigo de la deficiĵo: C. K. Sutcliffe 2s. 6p., T. W. Roff 2s. 9p., T. L. C. Bluett 10s., J. Course (Royston) 51s., L.W. kaj J.D. 2s. 6p., M. Pearson 5s., F-ino E. Kay 10s., C. R. Dwyer 6p., F-ino E. G. Stacy 8s., E. K. Osmotherly 5s., W. E. Collinson 4s., F-ino E. Berry 5s., F-ino C. Leadley-Brown 5s., R. N. Hanney 9s., J. B. Rayner 10s., A. N. Thomassen 5s., F-ino I. H. Niven 10s., H. O'Cuirc 2s. 6p., S-ino N. Goodliffe 5s., G. Shepherd 5s., H. Sewell 4s., H. Hyams 9s., V. Molyneux 5s., J. Course (Coventry) 4s. 6p., F-ino I. M. Cochrane 2s. 6p., E. Mila 4s. 4p., D. Tilly 9s.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

**STATISTIKO**

Jen la stato de la membraro je la fino de Marto, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Marto 1945:

	1945	1946
Asociaj Membroj ..	2455	4198
Individuaj Membroj:		
MJ .. .. .	564	685
MA .. .. .	1199	2880
MS .. .. .	93	219
Patronoj .. ..	21	23
DM .. .. .	73	92
HM .. .. .	8	19
	1958	3918
	4413	8116

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

**NASKIĜO**

**Moen**—Je 10 Aprilo 1946 al Ges-roj P. Moen, en Hago, Nederlando, filino nomita Nicolet.

**MORTO**

**Barbi**—S-ro Rag. Adalgiso Barbi, Delegito en Chivasso, Italujo, mortis en Oktobro 1945. Li estis bona kunlaboranto antaŭ kaj post la milito.

**PANJO, ĈU JAM ESTAS EBLE PLORI?**

La leganto amable permesu, ke mi rakontu al li (aŭ ŝi) pri la patrino juda kaj ŝia infaneto.

Tiuj du estis kaŝitaj en nejuda domo, kiam la malamiko venis en Francujon. La infano ofte volis plori—kia infano ne emas plori?—kaj la patrino konsilis al la

infano, ke venos aliaj tempoj, sed ke en la nuna momento estas malpermesite plori, ĉar se oni aŭdos, ili estos perditaj . . . estas tempoj kiam oni ridas kaj tempoj kiam oni ploras, mia infaneto.

Kiam en ilia kelo aŭdigis la ĝojkrioj de la regajnita liberigo, la infano mallaŭte demandis, "Panjo, ĉu oni jam povas plori?"

El la lando de la murdintoj de pli ol kvin milionoj da judoj kaj tiom da alirasaj anoj de la homaro, alvenis en nian urbon kelkaj homoj, judaj viroj kaj virinoj. Ili estas junaj. La maljunaj jam ne venos; ilin oni mortigis. Ankaŭ ne venos niaj nepoj kaj nepinoj; ili estis tro junaj por la militmaŝino, do oni forpafis ilian vivon . . .

La revenintoj ne inklinas paroli. Tamen ilia silento parolas ofte pli elokvente ol vortoj. Rigardu tiun junan knabinon! Sur la brusto estas engravurita "Nur por oficioj!" Demandu tiun fortan junan homon, kion li faradis la tutan tempon en la koncentrejo kaj li mallaŭte diros al vi, "Mi elhakis la orajn dentojn de la mortintaj judoj. Tial la Germanoj permesis al mi vivi . . ."

La ĉefkrimulo staris antaŭ la forumo kaj kriis, "Kion ili volas? Kial ili kriacas kaj ploradas? Mi ne kurbigis eĉ haron de la judoj!"

Li pravas en tio, ili ja ne kurbigis la harojn de la judoj; ili detranĉis ilin!

Tiu lando, kie tio povis okazi ankoraŭ ekzistas, kvankam ne plu rekonebla. La gvidanto ja diris profetmaniere, "Donu al mi kelkajn jarojn kaj vi ne plu rekonos la landon!"

La puno alvenis; ĝi konsistas el la faruno, kiun iliaj malamikoj (morale) devas sendi al ili; la puno konsistas en tio, ke ili ne havas ĝenitan konsciencon; la puno konsistas en tio, kion respegulas la vortoj de la juda patrino al la infano, "Jes, vi jam povas plori." Oni buĉis la patron de la infaneto kaj ili enflamigis mian patrinon kaj miajn fratinojn. Honoron al la mortigitaj viktimoj!

*Y. Armony, Palestino*

*Rim. de Red.*—Ne kunligante nin kun la esprimo de maldolĉa riproĉo sugestata en la ĉi-supra artikoleto, ni volonte ĝin presigas ĉar ĝi estas aktuala kaj respegulas vidpunkton tre vastigitan en la nuna tempo.

Ni preferas vidi en ĝi konscienciproĉon ne aparte kontraŭ la aludita nacio, sed kontraŭ la tuta homaro, kiu povis permesi la ekeston kaj maturiĝon de la barbaraĵoj de la pasintaj dek jaroj. Ni memoru ankaŭ Ĉinujon!

**Se vi havas amikon** aŭ familianon inter la soldataro en Aŭstrujo, varbu lin por Esperanto! Se ĉiu eksterlanda soldato lernis en Aŭstrujo dum tri monatoj Esperanton, en Aŭstrujo staras la lulilo de la mondpaco. Inter la Aŭstroj marŝas la Esperanto, kunmarŝu!

**Fotografademuloj!** Mi deziras interŝanĝi fotografiajn 6×9 cm. kun ĉiuj landoj. Garantiata respondo. S-ro M. Garcia Vazquez, calle Bailén 45-2, Madrid, Hispanujo.

**Ilustritajn poŝtkartojn** deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj, S-ro José Domínguez, paseo de los Olmos 18, Madrid, Hispanujo.

**Alumetujoj:** Mi estas kolektanto de bildoj ktp, sur alumetujoj. Tre plaĉos al mi interŝanĝi kaj ricevi ĉiuspacajn. S-ro D. H. Lang, 62 Westbury Court, London, S.W.4, Anglujo.

**Esperanta filatelisto** deziras interŝanĝi (aŭ aĉeti) poŝtmarkojn kun samideanoj en ĉiuj landoj. Se vi deziras, mi interŝanĝos ankaŭ leterojn. Sendube mi respondos. Bonvolu skribi al: S-ro J. C. Taylor, 150 Markland Hill Lane, Heaton, Bolton, Lancs., Anglujo.

**Filatelan korespondadon** kaj poŝtmark-interŝanĝon ĉiulande. Arthur Petersson, Langgatan 1, Karlskrona, Svedujo.

**Ĉu vi jam aliĝis** al la Gildo de Sankta Ajdan? Ĝi estas kultura kunularo, kiu eble interesos vin. Nenia kotizo. Plenan informon de: Gildestro, GSA (Ril. 23) Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Anglujo.

**Dentistoj** — S-ro Metroy, dentisto, en Frevent, Pas de Calais, Francujo, deziras korespondi kun kolegoj tutmondaj pri sia metio.

**Gunnar Nilsson** (15-jara) Brunflövågen 25, Kjallberg, Ostersund, Svedujo, kaj H. Alexandersson, Radhusgatan 76, Ostersund, Svedujo deziras korespondadon kaj interŝanĝadon.

**100 geesperantistoj** en 4 diversgradaj kursoj deziras korespondi tutmonde. Esperanto-Klubo, City Literary Institute, London W.C.2.

**Sendu ilustritajn poŝtkartojn** por infan-grupa letervespero okazonta en Majo. Respondo garantiata. S-ro Johs. Bendtsen, Ganer, Skjern, Danlando.

**“Paca Batalo”** Atlantapad 22, Hoogezand, Nederlando okazigos letervesperon mez-junior. Skribu ĉiu. Nepre respondos.

**Esperantistoj** de la tuta mondo, sendu leterojn kaj poŝtkartojn al S. van der Veen, Luth, Kerkstr. 86, Sappemeer, Nederlando. Garantis respondon.

**Mi deziras korespondi** kun gepedagogoj pri pedagogio de primitivaj kulturoj. Cetero interŝanĝi infandeseĝojn kaj infan-bildlibrojn de ĉiuj landoj. Jens Sigsgaard, ĉefo de Froebelseminario, N. Frihavns-gade 9, Kopenhago Ø, Danujo.

**Ĉu vi konas** gekriplulojn aŭ gemalsanulojn? Helpu ilin “vojaĝi” per Esperanto, “renkonti” alilandajn gemalkapablulojn. Sendu al ni iliajn adresojn. Anglaj kripluloj sendos simplajn leterojn kun “slosilo” por interesi ilin. G. F. Pentin, “Raglan”, Spencers Lane, Melling, Liverpool, Anglujo.

**Por interesi la anojn** de vigla kurso la gvidanto deziras fari, pere de ilustritaj poŝtkartoj, vojaĝon ĉirkaŭ la mondo. Eĉ se ne daŭra korespondado dezirata, afable sendu almenaŭ unufoje interesan karton kun zorga priskribo de la vidaĵo. S-ro C. P. Cocks, 158 Morland Road, Croydon, Anglujo.

**S-ro Jaromír Pavlacký**, Veselí nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo, 33-jara komercisto, deziras korespondi lettere kaj poŝtkarte kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Certe respondos.

**Jugoslavujo, Novisad** — Jozefo Vécsey, vitrajisto, korespondas nur pri fakaj temoj, akceptas reprezentadon de vitrajistaj ilaroj, bildoj sanktaj kaj profanaj. Novisad, Ul. Jug. Armije 112.

Tutmondaj geesperantistoj jam legas la interesan gazeton

## LA VERDA FLAMO

Ĝi estas tre riĉa laŭ enhavo, bonege redaktita, bona instruilo, kaj aperas regule ĉiumonate.

Tutjara abono (por 12 numeroj) 6 ang. ŝil., aŭ 60 francaj frankoj, aŭ 15 internaciaj respondkuponoj.

**Abono komencebla ĉiumonate.**

Adreso de la Redakcio kaj Administracio:

**5 rue Savorgnan de Brazza, Casablanca, Maroko.**

Abonoj akceptataj de I.E.L.

**La nova gazeto  
por ĉiu!  
- interesa  
- 12 paĝa  
- ilustrita**



La abonkotizo por tiu sen-  
dependa monata gazeto estas  
por la jaro 1946 19 int. resp.  
kuponoj aŭ egalvaloro al landa  
peranto. Provnumero kontraŭ  
unu int. resp. kupono.

**MONDA REVUO** ilustrita,  
Poŝtkesto 30,  
Randers, Danujo.

Facila kaj interesa  
legolibro

**OKAZAS  
NENIO**

Originale verkita en  
Esperanto

de  
CHR. HOUGAARD

Prezo : 2 ŝil. aŭfranko 2p.

Mendu ĉe I.E.L.

**LA INTERNACIA ASOCIO DE  
POŝTMARK-KOLEKTANTOJ**

1. Se vi ankoraŭ ne ricevis ekzempleron de nia Internacia Bulteno, petu ĝin senpere de la Org. Sek. kies adreson vi trovos ĉi-sube.
2. La kotizo al la Asocio estas po kvin ŝilingoj jare, kaj tiu kotizo rajtigas membrojn ricevi servojn de ĉiuj sekcioj de la I.A.P.K.
3. "La Poŝlibreto de I.A.P.K." klarigas ĉiujn celojn kaj pritraktas niajn metodojn. Sendu neuzitan poŝtmarkon de via lando je valoro de ordinara letero kaj vi nepre ricevos ĉi tiun utilan libreton.

Org. Sek : **P. H. LEWIS**

**XPDO House, Didcot, Berks., Anglujo**

